202
ESPER... BRNO, ČEHOSLOVAKIO.

GVIDLIBRO TRA BRNO

ĉefurbo de Moravio, Ĉeĥoslovakio. 222.000 da loĝantoj.
Eldonita sub aŭspicioj de Esperantista klubo en Brno.



Panoramo de Brno kun la kastelo Špilberk.

I. Al fremduloj!

Se vi vojaĝas en Moravion kaj en Silezion, vizitu la Moravian landan informejon por fremduloj en Brno (Zemský cizinecký svaz v Brně).

Gi donos al vi buŝe aŭ skribe ĉiujn informojn pri somerloĝejoj, banlokoj, hoteloj, naciaj festoj, Moravia Karsto, turistaj ekskursoj en Moravion kaj Silezion. Skribu esperante!

Zemský cizinecký svaz v Brně.
Brno, Náměstí Svobody 21.

Klišojn afable pruntedonis: Landa informejo por fremduloj en Brno. (Zemský cizinecký svaz v Brně.)

MEBLARO de memhelpanta asocio SVAT
konstanta ekspozicio kaj vendejo de metiaj laborajoj.
Brno, Česka 34, filio. Mor. Ostrava, Legionarska 18.
LA PLEJ BONA

Prezo Kč 1·50.

ĈIUJN VIAJN BANK-, BORS-
KAJ FINANCNEGOCOJN POR
EN- KAJ FREMDLANDO PERAS

MORAVSKA

LIDOVÁ BANKA

(MORAVIA POPOLA BANKO).

Centralo:
BRNO
(en propra domo)
Česká 26.

Filio:
PRAHA I.
(Pasporta oficejo de USONO)
Mikulášská 7.

2. Konsulejoj.

Aŭstrio, Kuliště 57. — Costarica, Sadová 12. — Danujo, Cejl 10. — Francujo, Náměstí Svobody 10. — Germanujo, Pařížská 6. — Hispanujo, Pařížská 6. — Meksikio, Janská 21. Nederlando, Třída legionářů 3. — Persio, Orlí 3. — Uruguay, Kiosk 11.

3. Tramvojo.

Tramoj: 1ª Královo Pole—V hlinkách.
2ª Ústřední hřbitov—Zábrdovice.
3ª V Táboře—Zábrdovice.
5ª Sadová—Komárov.
6ª Úřednická čtvrť—Jatky.

Dum labortagoj kostas malgranda bileto 80 hel. granda Kč 1·20, dum festotagoj kaj dimanĉoj nur Kč 1·20.

4. Hoteloj, kafejoj, vintrinkejoj, restoracioj.

Hoteloj: »Slávia«, U solnice 17. — »Plzeňský dvůr«, Jakobplaco 6. — »Grand Hotelo«, Palackého 18.

Kafejoj: En ĉiuj estas fremdaj gazetoj legeblaj. — »Akademická«, Falkenstejnerova (esperantista ren-

ESPERANTISTA KLUBO
BRNO, ČESKOSLOVAKIO

Librovendejo St. KOČÍ eldonejo
soc. kun lim. garantio
Brno, U radnice 9
Esperanta literaturo havebla.
Rekta interrilato kun fremdlando.

devnejo, vidu anoncon!). — Uřidilova (Bellevue). Lažanskýplaco. Biber. Nová 1 (vidu anoncon!). Hannak. Masarykova.

Vintrinkejoj: Dalmatinská (Jurišič). Středova. — »Plzeňský dvůr«. Jakobplaco 6. — »Vineria italiana«. Veveří.

Restoracioj: »U Cajplů«. Kozí 3. Nádražní (Stacidomo). — »U Pospíšilů«. Dominikplaco (vidu anoncon!). — Polenkova. Česká. — »Besední dům«. Kumenskýplaco (vidu anoncon!). — »Sokolský dům«. Nová 9 (vidu anoncon!). »Besední dům«. Královo Pole.

5. Posto.

Cefa pošto. Poštovská. — Stacidoma pošto. Stacidomo.

6. Vidindajoj.

Landa muzeo. Musejní 2. — Artindustria muzeo. Husova 14. — Urba muzeo kun bildgalerio. Dominikplaco. — Landa kaj universitata biblioteko (Nova landa domo). Veveří. — Urba arhivo. Dominikplaco. — Landa arhivo kun biblioteko (Nova landa domo). Veveří. — Kazematoj kun turmentiloj sur Špilberk. — Katakomboj če Jezuitoj.

„Praga" čehoslovaka akc. asocio magazena por transportado sur akvo kaj tero

Centralo: Brno. Palackeho strato 14—16.

Filioj: Villach. Venezia. Bohumin. Bratislava. Breclava. České Budějovice. Cheb. Hamburg. Kiralyhaza. Olomouc. Plzeň. Podmokly. Praha. Pontebba. Trieste. Udine. Wien.

DOMÁCNOST. BRNO. Česká 14.
Ceha porcelan-, keramik- kaj vitrajmagazeno.

Jesuitská. Magistrata domo, Radnická. — Fontano, Zelný trh. Kolono de Zderad, Křenová. — Centra tombaro, Vídeňská. Urba bučcjo, Jatky.

7. Tra la urbo.

El la stacidomo sur placo de Wilson ni iras tra Masarykavenuo, kie estas baroka palaco de landa financa direkcio. Maldekstre ni venos al placo Kapucínské kun kapitula pregejo (katakomboj kaj tombo de pandura generalo Trenk) kaj al Zelný trh (legomfoirejo) kun bela fontano »Parnas« nomata laŭ statuoj de Herkulo kaj Cerbero fontano de Herkulo. Iom pli malproksime staras kaduka statuaro de sankta Trinuo, teatro Reduta, kies antaŭa parto entenas urban vendhalon, Dietrichsteina palaco kun landa bildgalerio (Schwaiger, Jennewein, Švabinský, J. Uprka, Mucha, Kalvoda, Obrovský, Štursa, Fr. Uprka, krom malnovaj majstroj). Apude oni vidas landan muzeon kun folkloraj, natursciencaj kaj historiaj kolektaroj.

Kunveneja de esperantistoj

AKADEMICKÁ KAVÁRNA

rendevuejo de alterneja studentaro

Angulo de Augustinská kaj Falkensteinerova

Telefono 2878

Super la muzeo ekstaras pregejo de sankta Petro, fondita en la 9ª jarcento de duko Mojmir. En Radnická strato antikva magistrata domo kun gotika fasado enhavas faman hrnan radon kaj drakon.



Portalo de Magistrata domo.

La radon konstruis ĉarfaristo Birkner kiel veton el arbo matene faligita, kiun jam vespere je la sesa li

SOKOLSKÝ DŮM
BRNO, NOVÁ STRATO No. 9.
vendas hieron de České Budějovice kaj de Plzeň („Prazdroj"). Ĉelia kuirejo, ombroplena ĝardeno, Kunvenejo de Sokoloj.
JINDŘICH MAKARIUS, posedanto.

Inĝeniero MAX SINGER, elektroteknika firmo
Telefono 1339. BRNO, RŮŽOVÁ 3. Telefono 1339.
Ciuspecaj elektraj instalaĵoj. Liveranto de motoroj, fadenlampoj kaj ciuspecaj elektraj bezonaĵoj.

alruligis en Brnon. Brna drako estas efektive nila krokodilo, donaco de iu komercisto, en 14ᵃ jarcento.

Tra Dominikplaco kaj traira domo ni venos al la artindustria muzeo, Husova strato. Ce maldekstra flanko allogas nin Denisovy sady (parko) kaj antaŭ ni alteniĝas kastelo Špilberk (283 m) kun belaj promenvojoj aŭr la deklivo.

Špilberk kiel fortikajo estis malmulte difektita de sieĝintaj Svedoj kaj Prusoj. Famekonata ĝi fariĝis pro teruraj kazematoj, kien oni enfermis politikajn kulpintojn (Silvio Pellico, Maroncelli, grafo Bonneval, jakobeno Drouet, barono Trenk) aŭ poste eĉ rabistojn kaj ŝtelistojn. De la jaro 1857 oni uzis ĝin kiel kazernon, fine dum monda milito ĝi ree estis uzata kiel terura arestejo. En la muroj estas enigitaj ŝtonaj kanonkugloj el Sveda sieĝado.

De la Souches a monumento oni povas supergardi la tutan urbon. El belvidejo ni rimarkas Vídeňská straton kun centra tombaro kaj ŝirkaŭaĵn komunumojn.

BESEDNÍ DŮM, BRNO.
Ciutage vesperkoncerto.
Al ofta vizitado invitas
ALOIS VEČEŘA, RESTORACIESTRO

Forlasinte la kastelon, ni iros preter Besední dům, germana teknika lernejo, tra Údolní strato al nova universitato, kaj tra Obilní trh (apud landa akusejo), tra strato Falkensteinerova (direkcio de ŝtataj fervojoj, kafejo Akademická, (kunvenejo de esperantistoj), strato Veveří kun burĝa knabina lernejo (oficialaj esp. kursoj kaj klubaj kunvenoj), palaco de landa metiista konsilantaro, malnova ĉeha teatro. Kontraŭ la nova landa domo staras palaco de grafo Kounic. De tie ni alvenos al germana domo (brika konstruaĵo), al Kiosk, Nová strato, kie etendiĝas vasta parko Lužánky.

Revenante, ni enpaŝos Lažanský placon kun granda konstruaĵo de landestraj oficejoj (estinta monaĥejo) kun salonoj prezidentaj. Ĉe kontraŭa flanko leviĝas palaco de distriktaj kaj politikaj oficejoj.

Tra Kostelní strato kun preĝejo de sankta Jakobo, gotika konstruaĵo kun 3 navoj (turo 92 m), ni venos en Náměstí svobody (Placo de Libereco).

Náměstí svobody, granda, triangula urbplaco kun multaj famaj konstruajoj: Domo »U čtyř mamlasů«, ĉe kontraŭa flanko staras alta domo, kiun Brnanoj donacis al marŝalo Raduit de Souches, kiu defendis urbon kontraŭ Svedoj. Reĝa domo (kun angula tureto) en kiu loĝis anoj de reĝa familio vizitintaj

Skribmaŝinoj. – Underwood. – Oficejmeblaro.
Jerry. – Faka magazeno de kontora ilaro.

K. Vágner

Brno, Česká No. 16 – Telefono No. 1165.

STAMPILOJN fabrikas
VÁCLAV MÜLLER, Brno, Zámečnická 5.

Brnon. Palaco de grafo Kounic kun vendejo Zádruha. Meze de ĉefa placo alteniĝas statuo de Sankta Virgino, konstruita en la jaro 1680 je memoro al ekstermita pesta epidemio. Pavimita trotuaro de la kolono al proksima elektra horloĝo montras la direkton de brna meridiano.

Apud nobela palaco, nunc stata prokurejo ni enpaŝos Kobližná straton, kie estas sidejo de ĉefa militista komandejo, post ĝi, en Poŝta strato troviĝas grandega palaco de ĉefa poŝto. Al Urba teatro kun najbara domo de artistoj faras kontraŭajon granda palaco de dogano. Proksime de Urba teatro imponas juĝeja palaco kaj bela parko Kolištė. Ni revenas al stacidomo.

8. El la historio.

La fondiĝdato de l' urbo sitanta inter riveroj Svitava kaj Svratka ne estas konata. Jam en jaro 1048 oni aludas provincon »brunensis«. Ptolemaios en la 2ª jarcento p. K. mencias celtan urbon Eburo-

ARNOŠT KRECHLER A SYN
HORLOĜISTOJ
BRNO, ČESKÁ 7.
Horloĝoj, juveloj, or- kaj arĝentaĵoj gefianĉringoj, arĝentaj manĝilaroj k. t. p. en abunda elekto.
Telefono 1635.

dinum (fortikajo Špilberk). En la 12ª kaj 13ª jarcento Brno estis kolonigita per germanaj kolonanoj el Svablando kaj Rheinlando, kun kiuj la origina loĝantaro miksiĝis.

En la 13ª jarcento Špilberk defendas sin unuafoje dum la tatara invado. En la 15ª jarcento Brno estis sieĝita de Husanoj kaj en la 17ª jarcento de Svedoj. Tiam estis komandanto de Brnanoj Raduit, grafo de Souches (lia monumento sur Špilberk). Svedaj armeoj cirkaŭis Brnon 16 semajnojn sub la komando de Torstenson, sed vane. En la jaro 1742 sieĝis ĝin Prusoj. 1805 ĝi estis okupita de Francoj sub Napoleono kaj en la jaro 1866 de Prusoj.

Dum la jaro 1214 fulmo bruldetruis duonon de urbo, 1306 ĝi estis denove bruldetruita, 1282 pesto ĝin atakis.

En la jaro 1814 tie ĉi estis konstruita unua vaporlokomotivo, 1839 komenciĝis transporto sur la fervojo Vídeň — Brno, 1914 okazis en Brno Sokola kongreseĵo.

Malnovaj kvartaloj estis: 1ª Interna Brno, 2ª Strato Nová, 3ª Strato Křenová, 4ª Malnova Brno. En la jaro 1919 la urbo estis kunigita kun 23 cirkaŭaj urboj kaj vilaĝoj formante grandan Brnon: Královo Pole, Medlánky, Řečkovice; Husovice, Maloměřice.

BRNA CENTRA BANEJO.
SOCIETO KUN LIMIGITA GARANTIO.
KOSTELNÍ 12.
KUVBANOJ. VAPORBANOJ. AKVOTERAPIAJ BANOJ KAJ NAĜEJO.
PERVAPORA TOLAJLAVEJO.

FELAĴOJ, ČAPELOJ KAJ ČAPOJ
FRANT. PAVLOUŠEK
PANSKÁ 1 BRNO PANSKÁ 1

Obřany; Židenice, Juliánov; Černovice, Komárov, Slatina; Tuřany, Vejvanovice; Horní Heršpice, Dolní Heršpice, Přízřenice, Bohonice, Líškovec; Žabovřesky, Komín, Jundrov, Kohoutovice, Kamenný mlýn. En Granda Brno vivas 222.000 da loĝantoj en 13.469 domoj sur areo da 123 km² 53 ha. Laŭ procentoj estas 61% da Ĉehoj, 34% da Germanoj. Meza jartemperaturo estas 8·6° C, meza supermara altco 200 m.

9. Kultura vivo, teatroj, komerco.

En la urbo estas 23 preĝejoj, ĉeha universitato, ĉeha kaj germana teknikaj lernejoj, supera agrikultura lernejo, supera veterinara lernejo, muzika konservatorio, teologia seminario, 2 gimnazioj, 6 reallernejoj, 3 realgimnazioj, 3 reformitaj realaj gimnazioj, 2 liceoj, 4 pedagogioj, 2 komercakademioj, 2 industriaj lernejoj, 2 tekstilaj lernejoj. Multaj Rusoj, Ukrajnanoj, Serboj, Kroatoj, Bulgaroj kaj Magiaroj studas ĉi tie. Aperas 10 ĉehaj ĵurnaloj ĉiutage, 4 germanaj.

KUDRAJ MAŠINOJ
rapidmovaj, originala Pfaffa specialajo por metio kaj industrio, plej perfektaj maŝinoj pur mastrumejo, maŝinkonstruado pur mehanika funkciado liveras por konkurprezoj
G. STAVÍČEK
faka mehanikisto, Brno, U solnice 8; stratangulo de Česká 26. — Rica magazeno. Mehanika laborejo.

Ĉiutage oni ludas en du ĉeĥaj kaj du germanaj teatroj. 30 bankoj. La urbo estas industria.

10. Rekomendindaj ekskursoj el Brno.

Unutagaj:

1. Moravia Karsto. Stalaktitaj grotoj kaj abismo Macocha. Mirindaĵo tutmonda! Fervoje ĝis Blansko. Prenu mantelon!

2. Luhačovice. Ĉarma banloko.

3. Lednice. Moderna kastelo kun belega parko.

4. Slovakio. Veturu (nur dimanĉon) en Hodonín aŭ en Uh. Hradiště por vidi riĉajn naciajn kostumojn!

5. Pernštýn. Mezepoka kastelo (fervoje ĝis Nedvědice). Haltu en Tišnov por vidi en Předklášteří belan gotikan portalon.

Duontaga: Batalejo apud Slavkov (Aŭsterlitz) 1805 kun monumento de paco. Generale la urbo Brno estas fame konata pro sia belega arbarriĉa ĉirkaŭaĵo.

11. Esperantista movado en Brno.

Unua klubo en estinta Aŭstrio nomita »Aŭstria societo de esperantistoj« estis fondita en Brno 1901 de redaktoro K. Pelant kaj J. Kajš. En klubo estis unuigitaj samideanoj ĉeĥaj kaj germanaj. En jaro 1905 la klubo dupartiĝis en klubon ĉeĥan »Klub českých

BĚHOUNSKÁ STRATO 19
MAGAZENO DE FELAJOJ
J. ZDRAŽÍLEK.

Riĉa elekto de modernaj felaĵoj de plej diverspeca laboro. La plej honaj surogatoj de francaj kaj vienaj laboraĵoj por sinjorinoj. Laŭ parizaj modeloj la plej rapida fabrikado laŭ mezuro. Oni akceptas felaĵojn por somera konservado. Garantio kontraŭ tineoj kaj stelistoj. Oni akceptas felojn por tano, kolorado kaj tanitaj por prilaboro. Propra ĉapfabrikado. Detala kaj pogranda vendado.

DRAPO. J. NOVOTNÝ & KOMP. BRNO. JAKOBPLACO 4.

esperantistů v Brně« kaj germanan »Verein deutscher Esperantisten in Brünn«. Post la milito la čeha kluho intencante fariĝi internacia, ŝanĝis sian nomon en »Esperantista kluho en Brno«.

Kunvenoj de čeĥa klubo okazas mardon vespere je la 8ª horo en lernejo če strato Veveří 28 kaj en »Akademická kavárna« dejoras ĉiutage 5—7 vespere unu membro.

Prezidanto: Rudolf Fridrich, prof. de franca lingvo, instruas en Královo Pole, gimnazio, placo Mojmír 10, loĝas en Královo Pole, Purkyňova strato 79.

Viceprezidanto: Jan Šembera, fakinstruisto, instruas Veveří 28, loĝas Francouzská 72, II.

Aliaj esperantistoj pretaj servi fremdajn samideanojn:

Josef Barvíř, čefkomisario de fervojoj, sekretario de la klubo, Pražská 23.

Jaroslav Sítko, fervoja inspektoro, trovebla en stacidomo Vª fako.

Inĝ. Vincenc Kroužil, prof., instruas če industria lernejo »U průmyslovky«, loĝas V táboře 11. Delegito de U. E. A.

Frant. Štouračˇ, vitristo, loĝas Veveří 30.

GENERALA ASEKUREJO
AKCIA SOCIETO EN PROPRA DOMO
ŠVEDSKÁ STRATO 6-8 CIUSPECA ASEKURO.

KOMERCA BANKO BRNO,
PERAS CIUJN BANKAJN CIROJN, PRECIPE EN LA DEVIZFAKO KAJ VALUTPAPEROJ EN BURSOJ DE PRAHA, WIEN, BUDAPEST KAJ BERLIN. Telegr: Kupobanka. Telef. 2821, 2822.

Josef Ježábek, fakinstruisto, loĝas Trávníky 2.
Nombro de anoj: 90.

Kunvenoj de germana klubo okazas ĉiun lan kaj 3an jaŭdon en Moravenhaus, Údolní strato, je la fino de la surstrata elektra tramo.

Prezidanto: Franz Podloučka, Mor. landa supera konsilanto, oficejo: Porodnice (landa akuŝejo), loĝas Úvoz 82. I.

Viceprezidanto: Alois Schwarz, Mor. landa supera konsilanto, oficejo: Zemský dům, Joštova, loĝas Olomoucká 2.

Aliaj anoj parolantaj esperante:

Richard Chlup, instruisto, loĝas Stará 21.

Margarete Hübner, poŝtadjunktino, loĝas Údolní 42.

Franz Pawelka, ĉambropentristo, loĝas Trnitá 41.

Moldavia-Generali

AKCIA ASEKUREJO EN PRAHA
FILIO POR MORAVIO KAJ SILEZIO

EN BRNO

BĚHOUNSKÁ STRATO 1

FONDINTO: ŽIVNOSTENSKÁ BANKA

REKOMENDAS ASEKURON:

*KONTRAŬ BRULO ** KONTRAŬ HAJLO*

KONTRAŬ DOMŠTELISTOJ

DUM TRANSPORTO

AVANTAĜAJ KONDIĈOJ!

REPREZENTANTOJ AKCEPTOTAJ!

Johann Siruczek, lernejestro en pensio, loĝas Pražská 57.

Nombro de anoj: 30.

Esperantistoj el Brno zorgis pri la eldono de sekvantaj libroj:

1. Ĉeha literaturo laŭ la birdperspektivo. Verkis Arne Novák. Tradukis Vincenc Kroužil.

2. Esperanto, mezinárodní jazyk inženýrů. Tradukis V. Kroužil.

3. Moravia Karsto. Tradukis Jos. Barvíř. Ilustrita.

4. Úprka: Ligado de kaptukoj. Kun antaŭparolo de J. Barvíř. Belega ilustrita folklora verko.

5. Úprka: Pilgrimo ĉe sankta Antono. Kun antaŭparolo de Josef Barvíř. Belega ilustrita folklora verko.

Papero, kartono, skribilaro kaj oficeja ilaro

Ascher & Redlich, Brno,

Náměstí Svobody No. 2

Fondita 1894. Telefono 287 (interurba)

Faka magazeno por lernejo, mastrumejo, teknika kaj komerca oficejo, desegnisto kaj pentristo.

SPECIALAJOJ:

Unuaranga kverka meblaro por oficejoj, parolejoj. Patentaj desegnotabloj, fototipiaj maŝinoj, kontoraj maŝinoj kun apartenaĵo. Fajroresistaj kasoj.

PROPRA LABOREJO POR RIPARO DE KONTORAJ MAŜINOJ.

Ni havas en stoko. Valoran kaj laŭdfamen unuarangan

SKRIBMAŜINON „OREL" KAJ „AVANTI".

la plej bonan kalkulmaŝinon por ĉiuspeca kalkulado

„BRUNSVIGA"

multobligantan maŝinon su por desegnaĵoj

„OPALOGRAPH".

VIZITATA DE ESPERANTISTOJ
RESTORACIO DE POSPÍŠIL
DOMINIKPLACO.
MALKARAJ MANĜAĴOJ KAJ TRINKAĴOJ.

6. Gvidlibro tra Brno. Skribis Jan Šembera. Eldonita sub aûspicioj de Esperantista klubo en Brno.
7. Machar: Benedek. Tradukis R. Fridrich.
8. Vidaĵkartoj el Moravia Karsto.
9. Bonaj flugfolioj kaj propagandiloj.

Riceveblaj ĉe la Klubo.

Novmoda komercaĵo
por gesinjoroj, tapiŝoj, kurtenoj
estas plej avantaĝe aĉeteblaj ĉe firmo
RUDOLF ZÖLLNER
societo kun limigita garantiadevo
BRNO. NÁMĚSTÍ SVOBODY 23.
Sportaĵoj por somcraj kaj
vintraj sportoj.

KAFEJO BIBER
NOVA STRATO 1.

Tion ĉi libreton preparis kaj eldonis al kongresanoj 1922 samideanoj Šembera, Fridrich kaj Jeřábek — Presis Polygrafia Brno.